



JARA RAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2012–2013

Enhavo:

1. Konsciigo

- 1.1. Preleg-vojaĝoj
- 1.2. Gazetara komunikado
- 1.3. Le Monde de l'espéranto (LME)
- 1.4. Esperanto-Aktiv
- 1.5. Expolangues

2. Kapabligo

- 2.1. Instruado
- 2.2. Ekzamenoj
- 2.3. Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno
- 2.4. Afrika solidareco

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Lille 2015
- 3.5. Kulturo
- 3.6. Grundtvig

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilatoj kun UEA
- 4.2. Rilatoj kun SAT-Amikaro
- 4.3. Statuto kaj interna regularo
- 4.4. Komitato kaj membraro
- 4.5. Financoj

5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

Enkonduko

Ĉi jare ni proponas al vi nov-forman Jaran Raporton, prezentitan kaj ordigitan laŭ la strukturo de la laborplano de la nova estraro de UEA, elektita en 2013 dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko (Islando). Laŭ tiu strukturo jam estis prezentita laborplano de Esperanto-France. La ĉi-suba Jara Raporto uzas la saman strukturon, kun **la 4 K** : **K**onsciigo, **K**apabligo, **K**omunumo kaj **K**unordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala Asembleo okazonta en Chambéry aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto. Apartan dankon al Raymonde Coquisart kaj Aleks Kadar, kiuj multe laboris por ĝi, kaj al niaj kasistoj, kiuj baraktadis pri la financa raporto. Dankon al la kontrollegintoj, i.a. Emmanuelle Richard.

Agrablan legadon deziras al vi
la estraro de Esperanto France

1. Konsciigo

1.1. Preleg-vojaĝoj

Raporto pri la prelegvojaĝoj de Esperanto France, de oktobro 2012 ĝis decembro 2013

En oktobro 2012

Eddy Raats (Belgio) preleg-vojaĝis en 5 urboj, dum 10-taga vojaĝo.

Fine de oktobro

La turneo de Svetlana Smetanina, dum novembro, estis la sesa de 2012. Ŝi estis invitita de Hérouville. Ĝi okazis de la 26a de oktobro ĝis la 1a de decembro. Nia rusa amikino vizitis 9 klubojn kaj instruis dum staĝoj en Grésillon kaj en Hérouville. Aperis 6 artikoloj. Meza vetura elspezo por la kluboj : 34€.

En 2013

En 2013, okazis 5 turneoj. Bedaŭrinde lastminute Tomasz Chmielik, el Pollando, rezignis pro akcidento. Turneis:

- Mikaleo Bronŝtejn
- kaj Andrej Grigoriev, ambaŭ el Rusio,
- Hori Jasuo kun Arai Toŝinobu el Japanio,
- Petro Chrdle el Ĉekio.
- La lasta okazis en decembro : Zhang Ping (Ĝoja), el Ĉinio.

Mikaelo proponis novan turneon, Andrej estis invitita por partopreni la jaran aranĝon de Esperanto France kaj SAT-Amikaro, Hori Jasuo kaj Arai Toŝinobu proponis tiun sesan kaj lastan turneon por raporti pri Fukuŝima, Petro Chrdle estis invitita de la priturna organizanto, kaj Aleks proponis turneon al Ĝoja dum la UK en Islando.

La plej longa prelegvojaĝo estis tiu de M. Bronstejn : li restadis tutan monaton kaj vizitis 15 klubojn. La aliaj daŭris 15-20 tagojn. Entute estis 51 etapoj en 27 urboj/kluboj.

Ricevis unu viziton : Grésillon, Clermont-Ferrand, Saint-Nazaire, Angoulême, Kvinpetalo, Herbignac, Nantes, Angers, Toulouse, Grenoble, Gérardmer, Lyon, Dinan, La Ciotat.

Du vizitojn : Bourges, Le Mans, Ariège, Dijon, Thionville, Amiens.

Tri vizitojn : Périgueux, Vendée, Hérouville, Lille.

Kvar vizitojn : Châteauroux, Tours, Paris.

Meza vetura elspezo por la kluboj : 44 €.

La prelegantoj renkontis proksimume 2000 homojn. Plej sukcesaj, laŭ la nombro de ĉeestantoj, estis la prelegoj de **Hori Jasuo** pri Fukuŝima ĉar la temo tre aktuala interesis multajn homojn kaj diversajn lokajn asociojn kiuj kunlaboris kun la E-o asocioj por organizi aŭ ĉeesti la kunvenojn. Notinde kun Mikaelo Bronŝtejn, Hori Jasuo kaj Zhang Ping okazis intervenoj en diversgradaj lernejoj, ĉiam kun granda sukceso kun la lernantoj kaj la instruistoj.

Andrej Grigoriev partoprenis la kongresojn de Esperanto-France kaj SAT-Amikaro, kaj niaj japanaj amikoj la ĝeneralan asembleon de la normandaj esperantistoj.

Aperis artikoloj en lokaj kaj regionaj gazetoj, ankaŭ okazis intervjuoj sed ne en ĉiuj urboj. Videble, ne estas ĉiam kaj ĉie facile havi fruktodonajn kontaktojn kun la ĵurnalistoj kaj pli ĝenerale efike reklami la kunvenojn. Pripensinda punkto.

Eĉ se la trajno ne ĉiam akuratis, eĉ se la vetero kelkfoje malhelpis interklubajn vojaĝojn, tamen la prelegvojaĝoj bonorde okazis. La prelegantoj proponis interesajn kaj diverstemajn prelegojn. La kluboj bone kaj varme akceptis ilin. Ili bone kunlaboris inter si kaj kun la organizanto.

Ĉiuj informoj pri la prelegturneoj legeblas (franclingve) en la retejo de Esperanto-France : <http://esperanto-france.org/conferences>

Yves Nicolas

1.2. Gazetara Komunikado

En la jaro 2013, Espéranto-France komunikis al la gazetaro:

- 31 Jan 2013 : "Nouvelle édition de Tintin en espéranto : *La Templo de l' Suno*"
- 04 Feb 2013 : "Espéranto-France de retour à Expolanges"
- 24 Jul 2013 : "Le congrès mondial de Reykjavik : La chaleur de l'espéranto et la fraîcheur de l'Islande"
- 15 Sep 2013 : "Soirée voyage : huit ans autour du monde"
- 23 Okt 2013 : "*Gravity*, Esperanto filmoj et les films en espéranto"
- 25 Nov 2013 : "Conférence de presse de Zhang Ping, journaliste de Radio Chine Internationale"

La gazetaraj komunikoj estas legeblaj el: <http://esperanto-france.org/communiqués-de-presse-2013>

1.3. Le Monde de l'Espéranto

Aperis du numeroj (583, 584-5) dum la koncerna periodo, el kiuj unu estas duobla. Aperis la numero 586 en decembro 2013.

Ĝi estas redaktita de Claude Nourmont, la grafikan laboron prizorgas Bruno Flochon. Regule kunlaboris i.a. Monique Arnaud kaj aliaj partoprenantoj de la projekto Grundtvig IDEO, Janine Dumoulin (dulingva paĝo), Edmond Ludwig, Floreal Martorell (muzikaj novaĵoj). Relegas la revuon François Bartsch kaj Brian Moon.

En ĉiu numero aperas speciala dosiero foje en la franca pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj. La dosiero de la numero 583 temis pri « Espéranto et culture : 125 ans ». La duobla numero 584-5 temis pri « Vers une éducation interculturelle » kaj havis pli da paĝoj ol kutime en la franca, pro tio ke ĝi celis prezenti la rezultojn de la projekto IDEO ankaŭ al franclingvaj instancoj kiuj subvenciis la projekton. Alvenis

kelkaj novaj kunlaborantoj ĉefe por la paĝoj « Actualités » en la franca.

1.4. Esperanto Aktiv'

De februaro 2010, UFE kaj JEFO kune dissendis retleteron al ĉiuj membroj kaj personoj kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO). Tiu letero, verkita en la franca lingvo, prezentas kulturajn aferojn, kalendaron, agadojn de lokaj asocioj kaj librojn. Ekde decembro 2010, enretigo de nova formulo por la letero Esperanto-Aktiv, kun 4 regulaj rubrikoj : *Découvertes* (Axel Rousseau, Raymonde Coquisart), *Ils l'ont fait dans leur région* (Jeanne-Marie Cash), *Calendrier* (François Bartsch) kaj *Le livre du mois*. Skipo de pluraj personoj ĉirkaŭ Anne-Émilie Ravache, kiu zorgas pri redaktado, enpaĝigo kaj publikigo de la letero, helpe de Emmanuelle Richard por teknika flanko. Jeanne-Marie Cash enpaĝigas la artikolojn en PDF versio.

- Raymonde Coquisart fotokopias, enkovertigas kaj sendas paperan version al membroj kiuj ne havas retadreson.
- Pli ol **4000 personoj** ricevas la leteron kaj Nicolas Gaufillet zorge aligis membrojn de EF al tiu dissenda listo.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn tie : <http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni irante sur la saman retejon.

Monato	Numero	Malkovro	Libro de la monato
09/2013	EA 39	L'espéranto et les jumelages	<i>Plano B - Mobilizo por savi civilizacion</i>
08/2013	EA 38	Le Nord et l'espéranto, une longue histoire	<i>Traktaĵo pri ateologio</i>
06/2013	EA 37	Traduire un roman de l'espéranto au français	<i>Comme un vol d'oiseaux sacrés</i>
05/2013	EA 36	Langue maternelle, Espéranto	<i>Ĉe akvorando</i>
04/2013	EA 35	Les associations espérantistes	<i>Vignettes pour le congrès mondial à Reykjavik</i>
03/2013	EA 34	Un tour du monde grâce à l'espéranto	/
02/2013	EA 33	Les livres pour enfants en espéranto	<i>Ne ekzistas verdaj steloj</i>
01/2013	EA 32	Espéranto France à Expolangues	<i>Fifi la ŝafino</i>
12/2012	EA 31	Les revues en espéranto	<i>La templo de l'suno</i>
11/2012	EA 30	Tourisme et espéranto	<i>La mirinda Sorĉisto</i>

10/2012	EA 29	Projets philanthropiques en espéranto	<i>Min produktas vi</i>
---------	-------	---------------------------------------	-------------------------

1.5. Expolangues

En februaro 2013 Espéranto France ĉeestis la lingvo-foiron Expolangues en Parizo, post kelkara foresto. Franciliaj aktivuloj deĵoris, disdonis 2000 kalendarojn, 1000 flugfoliojn “Espéranto, La langue équitable”, alparolis 700 homojn, kolektis sesdekon da kontakt-slipoj vendis por 145,80 € da libroservo-varoj. William kaj Keĉjo gvidis fulm-kursetojn por pluraj dekoj da interesitoj, proksime de la budo. Anne-Emilie prezentis Esperanton en la franca signo-lingvo. Plie ni rajtis je “reta budo” (tio estas paĝo) en la retejo www.expolangues.fr Resume, sufiĉe sukcesa kaj kuraĝiga evento.

2. Kapabligo

- 2.1. Instruado
- 2.2. Ekzamenoj
- 2.3. Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno
- 2.4. Afrika solidareco

2.1. Instruado

2.1.1. MCE Grésillon

Depost 2010 Espéranto France estas membro de la Komitato de Kulturdomo de Esperanto (kastelo Greziljono) : ĝi estas elektita ĝis 2014 kaj nun reprezentata de sia prezidanto Axel Rousseau. Duono de la Komitato estas renovigita en junio 2012. Nia agadraporto kutime kovras periodon januaro – decembro, sed tiun ĉi mi verkis por la periodo septembro 2012 – septembro 2013.

Dum la koncerna periodo, ni organizis niajn proprajn staĝojn : Aŭtune 2012 (27.10 – 03.11, 24 partoprenantoj), Novjaro (28.12.12 – 02.01.13, 25 p.), Printempas (20.04 – 28.04, 48 p.), someraj staĝoj (06.07 – 27.07 kaj 03.08 – 17.08, entute 139 p.), do entute 55 noktoj kaj 1480 tranoktoj (meze 27 personoj), 4313 manĝoj. Ni ankaŭ komencis apliki nian programon je malfermo, akceptante ne-Esperantistajn luantojn. Okazis 14 luadoj + 2 nuligitaj, entute 49 noktoj, 16500 € da enspezoj.

Post hejtado, necesejaj tubaroj, kahelado de la manĝilejo, nia prioritato pri renovigo de la kastelo estis nova ekstera ŝtuparo ĝis la dua etaĝo, anstataŭ la ekzistanta, kiu ne kongruas kun la sekurecaj normoj. Claude Bensimon planis la tuton, petis de urbestro la rajton en februaro 2013, kaj fine la ŝtuparo estos konstruita inter la 12.11.13 kaj la 12.12.13, post la staĝo-sezono. La malnova ŝtuparo malaperos la 01.02.14. Novajn dulitajn ĉambrojn en la dua etaĝo ni planas malfermi en 2014.

Krom nia kutima programo, kursoj, KER-ekzamenoj, muziko, turismo, teatro, silvestra festeno... kun gastoj el diversaj landoj, Budapeŝto, Moskvo, Bamako... bela etoso por familioj... ni komencis malfermon al luantoj, kaj Esperantistoj (interalie REF, Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, 27.07 – 03.08, kun 38 gepatroj kaj 43 infanoj), kaj ne-Esperantistaj (ekzemple MEI, ekologia partio). Tiun malfermon ni ampleksigu serĉante ĉefe stabilajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn staĝojn kaj ne nur semajnfinojn...

2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)

La Kulturcentro Kvinpetalo en Bouresse (86) okazigis 8 staĝojn dum la jaro. Okazis 3 lingvaj staĝoj por komencantoj, komencintoj kaj progresantoj, gvidataj de Ansofi Markov, Philippe Cousson, Jean-Luc Kristos, Josée Lafosse. Denove okazis staĝo pri altnivela tradukado, kiun gvidis akademiano Brian Moon. Profesia ĉiĉeronino Catherine Kremer malkovrigis la regionon Haut-Poitou, kun ties historiaj kaj naturaj riĉaĵoj. Alain Favre, fungologo, promenis tra naturo kaj Vikipedio. Ankaŭ okazis staĝo, kie Ansofi instruis Esperanton pere de bildstrio *Ĉe la lago*.

Sed la plej atentindaj eventoj estis en junio. Jam duan fojon venis HORI Jasuo kaj ARAI Toŝinobu. Ili prelegis pri la nuntempa vivo en Japanio, post la cunamo, instruis kaligrafion kaj montris muzikinstrumentojn al staĝantoj. Kaj plian fojon ili intervenis en la elementa lernejo de Bouresse, je la granda plezuro de la infanoj.

La 23an de junio okazis en la festosalono prelego-koncerto *Ĉirkaŭ Karmen*, kiun prezentis la interregiona koruso Interkant', kun la entuziasma partopreno de la infanoj de la lernejo. Granda sukceso, la festosalono estis plenplena. Kvinpetalo integriĝas en la kultura vivo de Bouresse.

Claude Nourmont

2.1.3. Cours Internet

Espéranto-France mastrumas 3 Interretajn kursojn : la programo *Kurso de Esperanto*, la kurso *Gratuit d'Espéranto en 10 leçons* kaj *Gerda Malaperis* por progresantoj.

71 volontuloj korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2012 ĝis septembro 2013, 270 lernantoj aliĝis (338 en 2011-2012) kaj 56 finlernis la elektitan kurson (67 en 2011-2012).

Ingrid Malaquin mastrumas la kurson, Axel Rousseau zorgas la teknikajn problemojn kaj Emmanuelle Richard sendas diplomon kaj ekzempleron de *Le Monde de l'Espéranto* al la lernantoj kiuj finis la kurson.

2.2. Ekzamenoj

Dum la **unua tutmonda sesio** de la ekzameno pri la Komuna Europa Referenckadro (KER), la 9an junio 2012, partoprenis 356 homoj el 29 urboj, el kiuj **118 homoj** en Francio el 9 urboj (Arras, Avignon, Clermont-Ferrand, Grenoble, Limoges, LyonParis, La Roche-sur-Yon, Toulouse), la **duan sesion**, la 8an junio 2013, partoprenis 239 homoj el 24 urboj, inter kiuj 7 urboj en Francio (Arras, Avignon, Limoges, Lyon, Paris, La Roche-sur-Yon, Toulouse). Entute **75 homoj** en Francio partoprenis la KER-ekzamenan sesion. Apartan gratulon al la klubo en Arras, unua en la statistikoj pri tiu Dua Tutmonda Sesio, kaj laŭalfabete kaj laŭ nombro de poentaj akiritaj.

Vidu la tutajn statistikojn pri la KER-ekzamensesioj :

<http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/raporto/statistiko>

Filmeto estis farita dum la sesio en Arras :

<https://www.youtube.com/watch?v=TJM4ZpJgsxk&feature=share>

2.3. Petskribo Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno

La inter-asocia laborgrupo pretigis dosieron prepare al la rendevuo kun la franca ministerio pri edukado.

2.4. Afrika Solidareco

La amplekso de tiu agado ŝajnas malpli granda ol pasintjare, ĉu pro malpli da petoj el niaj afrikaj samideanoj?

Ŝajnas, ke, en februaro 2013, peto veninta el R. Corsetti sendi diversajn librojn al Latifou Gbadamassi al Lokossou (BENINO) restis neplenumita. Almenaŭ mi ne trovis signon de plenumo.

Plenumitaj donacoj :

RUANDO : Novembro 2012: 10 x Poŝamiko tra s-ro Pedro Hernandez el Madrid, por Kigali.

Junio 2013: 22 x Metodo 12 senditaj al : Ruanda Esperanto-Klubo, ADES Association, P.O.Box 2938 Kigali, Ruanda (108,52 €)

TOGOLANDO : marto : 10 x Metodo 12 kaj 5 x Poŝamiko + 250 ekz de kalendaroj tra s-ino P. Giommoni (Por Université de Togo, A. Adjevi) + 10 poŝvortaroj rekte senditaj.

BURUNDO : Januaro : Hassano Ntahonsigaye (ANEB) ricevis 10 x Metodo 12 por seminario, 10 skribilojn kaj multajn E-kalendarojn.

Aprilo/majo: 1 x dictionnaire pratique kaj 1 dict. Français-esperanto de Le pail. por NIYUKURI Gilbert Médecine II Université de Ngozi. *

ALĜERIO : Septembro 2013: 1 Vortaro franca-esp/esp-franca sendita al Belmiloud Ahmed en Tizi Ouzou (laŭpage de C. Nourmont).

Jeanne-marie CASH (komisiito pri la Fonduso Solidareco por Afriko), la 8-an de februaro 2014.

* Mi ne ricevis konfirmon pri tiu sendado, do ne certas.

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Lille 2015
- 3.5. Kulturo
- 3.6. Grundtvig

3.1. Butiko

Fine de 2012, Casterman eldonis novan albumon de Tincjo dankal la rilatoj de Michel Dechy kaj la traduko de Hervé Gonin.

Jen la dek plej venditaj varoj de la butiko en 2013 :

Titolo	Kvanto	Sumo
1 Templo de l'suno	489	5687.38
2 eta Princo	247	2296.00
3 Dictionnaire pratique (E/F - F/E)	56	1247.75
4 Grand dictionnaire français-espéranto	39	1057.05
5 Dépliant 'Espéranto LA LANGUE EQUITABLE'	9635	673.45
6 Cours rationnel d'espéranto (éd. 2006)	66	636.50
7 Mode d'emploi + DVD-rom PC	171	579.50
8 Poŝamiko	88	468.88
9 Grand dictionnaire Espéranto-français	20	451.95
10 Espéranto par la méthode directe	57	409.32

3.2. Sidejo

La Sidejo de Espéranto-France sekve de ricevo kaj traktado de nenombreblaj telefonalkvokoj, retmesaĝoj same kiel poŝtleteroj adresitaj al la sidejo :

- preparis kaj sendis pli ol 740 mendojn al niaj membroj kaj aktivuloj
- notis pli ol 900 (544 + 425) aliĝojn al Espéranto-France kaj abonojn al LME
- notis pli ol 360 aliĝojn al UEA kaj al UK 2013
- same kiel pli ol 200 abonojn al internaciaj revuoj

Ni prizorgis ankaŭ specifajn agadojn kaj projektojn :

- organizado de grupvojaĝo al UK 2013 (Rejkjaviko, Islando)
- registrado de aliĝoj kaj mendiloj por la Landa Kongreso 2013 (Artigues)
- daŭrigo de laboro por ordigi kaj ciferigi nian arkivan trezoron, vi povas konsulti la retejon : arkivo.esperanto-france.org (respondeculoj Régis Fournier kaj Jean Lazert)
- kunorganizado (Federacio IDF) kaj akcepto de pluraj prelegoj, kunvenoj, renkontiĝoj.

La sidejo estas malfermata lunde, marde, merkrede je la 9a ĝis la 18a horo (post la 18a horo preskaŭ ĉiutage okazas kursoj). Ĵaŭdo estas rezervata por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas ankaŭ antaŭvidintajn aŭ pasantajn vizitantojn.

Kiel kutime pluraj eksterlandanoj vizitis la sidejon en 2013 (el Kanado, Brazilio, Rusio, Japanio, Svislando...)

Vi estas bonvenaj dum viaj vojaĝoj en Parizo kaj tra Parizo, nia skipo (Liliane Bon, Hélène Le Bihan, Jean-François Mestelan, Jean-Louis Poulet) plezure montros al vi la sidejon, la arkivojn, la librojn...

Susanna Beglaryan

3.3. La landa kongreso

La landa kongreso okazis en Artigues-près-Bordeaux de la 8a ĝis la 11a de majo 2014. Tiu kongreso estis komuna kun tiu de la Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio. Dank'al tiu kunlaborado inter la francaj fervoĵistoj, la Bordozanoj kaj Esperanto-France entute partoprenis pli ol 250 homoj el 19 landoj. La programo estis riĉa : diversaj laŭstatutaj kunvenoj, prelegoj kaj ekskursoj. Estis ankaŭ okazo vidi la novan spektaklon de Karmen, interpretita de Interkant' kaj ĝui la bonan etoson kreitan de Kajto kaj la Kompanoj.

En 2014, la kongreso okazas en Chambéry.

3.4. Universala Kongreso Lille2015

En marto 2013 UEA elektis la kandidat-urbon Lille, portata de UFE, por akcepti la 100an Universalan Kongreson de Esperanto de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2015. De post tiam X. Dewidehem estis elektita vicprezidanto de UFE pri la Universala Kongreso kaj laboras precipe kun J. Hédoux kaj M. Dechy.

En decembro 2013 kunvenis volontuloj por diskuti organizajn principojn kaj elementojn kaj por konsistigi la landan kongresan komitaton (LKK). De post tiam la temaj skipoj el la LKK retkunvenas por labori pri komunikado

3.5. Kulturo

Tra la jaro la koruso Interkant' (kiu ricevis subvencion i.a. de UFE) preparas novan spektaklon, adaptita el *Carmen*. Gijom ankaŭ ricevis subvencion, je 250 EUR, por la projekto « miprovi » : jadeo.net/index.php/miprovi/

3.6. Projekto Grundtvig

Grundtviga projekto: Interkultura Edukado, defio por diverseca Eŭropo IDEO

La projekto subvenciita de la Eŭropa Komisiono el la programo Grundtvig enkadre de la programo « tutviva kleriĝo » (programme d'éducation et de formation tout au long de la vie) sukcese finiĝis la 31an de julio 2013. La raporto sendita al la instancoj estis aprobita.

Kvar partneroj partoprenis: Espéranto-France, Germana Esperanto-Asocio, Kataluna Esperanto-Asocio kaj Svisa Esperanto-Societo (kiu kunordigis la projekton). Kunordigis la projekton por Francio Claude Nourmont, kun ĉefaj kunlaborantoj Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet, Martine Freydier, Marie-Sylvie Jullian, Pascale Voldoire. Ili partoprenis plurajn laborrenkontiĝojn kun la partneroj en Germanio, en Svislando kaj en Francio.

Prezento de la rezultoj okazis en Artigues, en Herzberg kaj en Rejkjaviko. Aldone estis multaj laborkunsidoj inter la francaj partoprenantoj (entute 25 laborkunsidoj).

La rezulto de la projekto estas konstruo de retpaĝaro IDEO (adreso : <http://www.noos.ch/ideo/>). Multis la laboro por pretigo kaj nutrado de la retpaĝaro, kun kolekto de materialoj, tradukado, enretigo. Finpretigo de la fina raporto, kaj de financaj dokumentoj estis septembra maratono.

Ampleksa raporto aperis kiel dosiero ĉefe franclingva en LME 584-5.

Raportis : Claude Nourmont

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilatoj kun UEA
- 4.2. Rilatoj kun SAT-Amikaro
- 4.3. Statuto kaj interna regularo
- 4.4. Komitato kaj membraro
- 4.5. Financoj

4.1. Rilatoj kun UEA

Claude Nourmont reprezentas Espéranto-France ĉe la komitato de UEA. Ŝi partoprenis ties kunsidojn dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko. Francoj estis la dua plej granda grupo en la UK (post Japanio). Kiel ĉefdelegito de UEA por Francio daŭre rolas Renée Triolle.

Espéranto-France havas regulajn kontaktojn kun UEA. La sidejo zorgas pri perado de kotizoj kaj aliaj servoj.

4.2. Rilatoj kun SAT-Amikaro

Espéranto-France plenumis plurajn agadojn kun SAT Amikaro dum la periodo :

- Reta komuna datumbazo ;
- Petskribo por enkonduko de Esperanto en la abiturienta ekzameno (pétition « Espéranto au bac ») ;
- Komunaj vesperoj en Francilio (koncertoj, babiladoj, Café Espéranto...)

4.3. Statuto kaj interna regularo

Post modifo de la statuto far la Ĝenerala Asembleo, komenciĝis laboro por reviziado de la interna regularo, i.a. por anstataŭigi la diversajn kunlabor-kontraktojn inter UFE kaj la regionaj federacioj per klaŭzoj en la interna regularo de UFE.

4.4. Komitato kaj membraro

Elektita en Nantes (maje 2012), la komitato kunvenis 4 foje : majon 2012, oktobron 2012, januaron 2013, majon 2013.

Reprezentas la membrojn :

- Michèle Abada-Simon
- Jeanne-Marie Cash
- Raymonde Coquisart
- Julia Hédoux
- Philippe Debrix
- Christian Lavarenne
- Sébastien Montagne
- Axel Rousseau

Estraro :

- Prezidanto:

- Guy Camy
- Philippe Chavignon
- Karine Texier
- Didier Janot
- Aleks Kadar
- Xavier Dewidehem
- Claude Nourmont
- Anne-Émilie Ravache

Reprezentantoj de la asocioj (kontraktintaj) :

- Auvergne : Jean-Pierre Boulet
- Bretagne : Xavier Godivier
- Centre-Ouest : /
- France-Est : /
- Île-de-France : Didier Loison
- Languedoc-Roussillon : Véronique Bichon
- Midi-Pyrénées : Marion Quenut
- Nord : Claude Longue-Épée
- Poitou-Charentes : Marie-France Conde Rey
- Provence : Monique Arnaud
- Rhône-Alpes : Mireille Besset

- Vicprezidantino : Axel Rousseau
- Vicprezidanto eksteraj rilatoj : Julia Hédoux
- Kasisto: Philippe Debrix
- Vickasisto : Sébastien Montagne
- Ĝenerala Sekretario : Anne-Émilie Ravache
- Vicsekretario : Karine Texier
- Estrarano pri agadplano : Véronique Bichon
Didier Janot
- Espéranto Jeunes (JEFO) : /
- FET : Frédéric Scibor
- FKEA : Marie-Thérèse Marin
- GEE : Michel Dechy

Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo

Estis 544 membroj je la fino de la periodo 2012-2013, kontraŭ 553 membroj je fino de agadjaro 2011-2012 (30a de septembro 2012). Dank'al la novaj membriĝo-sistemoj, la nombro de membroj stabiligis, eĉ rekresketas.

5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

5.1.1. MEMBRARO

En la federacio estas ĉirkaŭ 70 esperantistoj (esperantoparolantoj kaj lernantoj). Bedaŭrinde, ne ĉiuj kotizas al esperanto-asocioj, ĉar kelkaj kursoj okazas en aliaj asocioj : EXEDRA (Montluçon -03), Université Populaire et Citoyenne, (Clermont-Ferrand -63), Espace Culture (MOZAC -63), Réseau d'Echange Réciproque de Savoirs (Vichy-Bellerive -03). En Puy-de-Dôme estas 42 membroj, en Allier : 25, en Haute-Loire : 6, kaj, en Cantal : 1.

5.1.2. MEMBROKUNVENO

La membrokunveno de la federacio okazis la 16an de decembro 2012 en Asocia Domo en Clermont-Ferrand. Ĉeestis 29 membroj. Kiel kutime, post la ĝenerala asembleo, la ĉeestantoj festis la naskiĝdat-revenon de L.L.Zamenhof. Al la ĝenerala asembleo venis ĵurnalisto kaj aperigis belan artikolon kun foto en la regiona ĵurnalo *La Montagne*.

5.1.3. REPRESENTANTO DE FEDERACIO

La reprezentato de la federacio en UFE-Komitato estas Jean-Pierre BOULET (anstataŭanto : Eugène PAPCIAK).

5.1.4. INFORMADO

Ne aperas federacia bulteno. La estraro rilatas kun siaj membroj per ret-leteroj kaj poŝt-leteroj. Teorie, la federacia retejo ekzistas sed ne viglas. Mankas fakuloj kaj homfortoj por vigligi ĝin.

5.1.5. Ekspozicioj

Ekspozicioj pri Esperanto estis prezentitaj dum Asociaj Forumoj en Mozac (07-09- 2013) , en Clermont-Ferrand (5 & 6/10/2013) kaj en Bellerive (sept. 2013). La federacio propagandas pri Esperanto en ĵurnalo *La Montagne* aperigante inform-anoncojn pri membro-kunvenoj, renkontiĝoj en Kulturaj Kafejoj, kunvenoj kun eksterlandaj gastoj, kursoj kaj ĉiu-specaj aranĝoj Krom tio, aperis en la sama ĵurnalo, deko da ampleksaj artikoloj kun fotoj pri eventoj supre menciitaj kaj pri diversaj aranĝoj naciaj kaj internaciaj en kiuj partoprenis aŭverniaj esperantistoj (esperanto-kongresoj, UNESKO-konferenco, staĝoj...)

5.1.6. INSTRUADO

Esperanto-kursoj funkciis en Clermont-Ferrand por komencantoj (3), progresantoj (3), spertuloj (6) ; en Moulins por progresantoj (6) ; en Montluçon por progresantoj (4), en Mozac por progresantoj (5), kaj spertuloj (5) ; en Issoire por komencantoj (3). Ekzameno ne estis organizita en 2013.

5.1.7. PRELEGOJ

Publikaj kunvenoj estis organizitaj dum vizitoj de eksterlandaj gastoj : Svetlana SMETANINA (Rusio) en novembro 2012 (UFE-turneo) kaj Ana SHIN (Korea Respubliko) en aŭgusto 2013. Svetlana Smetanina estis intervjuata en studenta radio « Radio Campus »

5.1.8. Partopreno en kongresoj, staĝoj

Unu reprezentato de la federacio iris al 98-a UK okazinta en REJKJAVIKO, tri partoprenis en la Itala Kongreso en Castellano apud San Remo ; sep partoprenis en UFE-IFEF kongreso en Artigues-près-Bordeaux ; unu iris al SAT-Amikara Kongreso en Métabief (25). Multaj aliaj partoprenis en aranĝoj naciaj kaj internaciaj (UNESKO-Konferenco en Parizo, OSIEK Konferenco en Saint-Amand-Montrond, Internacia Festivalo Novjara en Dortmund, Internacia Kultura kaj Turisma Semajno en Lloret de Mar) – kaj en staĝoj (Plouézec, Grésillon, Les Issambres, Martin en Slovakio)...

5.2. Fédération Espéranto-Bretagne

Rapport d'activité 2012 (année civile)

Nombre de membres 2012 : 266, dont 250 par l'intermédiaire des clubs locaux et 16 en indépendants

Nombre de personnes participant à des cours hebdomadaires de langue espéranto :

- Côtes d'Armor : 81
- Finistère : 25
- Ille-et-Vilaine : 29
- Morbihan : 43
- Total élèves : 178

Enseignement : Il faut ajouter les stages intensifs de week-end organisés à Saint-Brieuc (51 participants en 2 fins de semaine) et Vannes (80 participant en 5 samedis), les cours par correspondance auprès d'organismes nationaux ainsi que les cours par internet sur des sites gratuits

La Fédération regroupe 20 groupes locaux, dont certains sont eux-mêmes regroupés au sein d'associations départementales, dans les villes suivantes :

- Côtes d'Armor : Saint-Brieuc, Saint-Quay-Perros, Lannion, Trédez-Locquemeau, Guingamp, Dinan et Plélan-le-Petit, regroupés dans l'association « Espéranto-22 » ; Plouézec
- Finistère : Quimper, Landerneau
- Ille-et-Vilaine : Rennes, Saint-Malo, Montfort-sur-Meu, Chartres-de-Bretagne
- Morbihan : Vannes, Lauzach, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient

Montant de la cotisation 2012 : adhérent à une association locale : 7 € par personne, 11 € pour un couple. Membres individuels habitant hors Bretagne : 11 €, en Bretagne 20 € (pour inciter les adhérents à s'inscrire par l'intermédiaire d'une association locale). Scolaires, étudiants, chômeurs : 3,5 €

5.2.1. Actions de la Fédération

- Édition du Bulletin de liaison et d'information Espéranto-Bretagne « La Verda Triskelo » (« le triskell vert) 2 fois /an et d'un bulletin international une fois par an, la « Verda Triangulo » (le triangle vert) commun à trois fédérations :
 - Fédération Bretagne : le responsable est Bert Schumann ;
 - Fédération de la Région Saxe (Allemagne) : les responsables sont Benoît Philippe et Steffen Eitner ;
 - Fédération de la Région Silésie (Pologne) : la responsable est Teresa Pomorska.
- Organisation de tournées de conférences d'étrangers espérantophones
 - Du 2 mars au 6 avril 2012, le Cubain Miguel Angel Gonzalez Alfonso, dont les frais de voyage et de séjour ont été pris en charge par notre Fédération, est intervenu dans des soirées-débats ouvertes au public auprès de 19 associations de Bretagne et de Loire Atlantique, a participé à notre Assemblée générale le 25 mars 2012 à Loudéac et est intervenu au congrès national des cheminots espérantophones à Angers du 2 au 4 avril 2012.
- Jumelages
 - Correspondance avec Liu XIAOJUN dans le cadre du jumelage des deux fédérations d'espéranto de Bretagne et du Shandong et avec PENG Zhegming pour un partenariat avec l'association d'espéranto de Wuhan.

- Édition
 - Pas d'édition cette année. La vente du livre *Anecdotes sur Confucius* trilingue : français-chinois espéranto, ainsi que du CD de chansons bretonnes traduites en espéranto, édités par notre Fédération, se poursuit favorablement.

- Le chœur régional MEVEN
 - La chorale régionale MEVEN prépare avec le chœur international Interkant' une conférence-concert en espéranto sur l'opéra Carmen, sous la houlette de Franjo Lévêque, chef de chœur et espérantophone de Saint-Brieuc, avec en perspective plusieurs concerts en 2013.

- Divers
 - La FEB joue son rôle de conseil auprès des clubs, participe à la coordination des actions régionales, et recherche des partenaires et des correspondants étrangers ;
 - Elle effectue des animations à la demande, là où n'existe pas d'association locale susceptible de le faire. En janvier 2012, nous étions présents au forum *Partir à l'étranger* organisé à La Guerche-de-Bretagne (35) par le *Point Information Jeunesse* de Vitré et en avril nous avons effectué une conférence au Rotary-Club de la Guerche ;
 - Gestion du site internet <http://esperanto.bretonio.free.fr/> de la Fédération par Bert Schumann, bénévole de l'association rennaise affiliée, et modération de la liste de discussion de nos membres bretonio@yahoogroupes.fr par quatre bénévoles ;
 - Organisation de l'assemblée générale, qui a lieu chaque année en mars à Loudéac

5.2.2. Actions de nos associations adhérentes

Elles sont chargées de la diffusion de la langue espéranto et pour ce faire organisent des cours, stages, examens, rencontres avec des étrangers espérantophones, correspondances collectives, participent à des opérations de jumelage, à des forums de langues, des forums d'associations et diverses manifestations. Elles réunissent aussi leurs membres autour d'activités en espéranto dans des domaines divers : jeux de rôle, théâtre, chant choral, randonnée, informatique, etc. En plus de ces actions traditionnelles, certaines réunissent leurs membres autour d'activités remarquables.

Voici quelques-unes de leurs opérations-phares au cours de l'année 2012, en plus ou autour de l'accueil de conférenciers étrangers de Cuba et de Pologne.

CÔTES-D'ARMOR :

Accueil, de janvier à septembre 2012, du jeune lycéen brésilien Igor Ferreira, en provenance de la ferme-école brésilienne Bona Espero, créée et gérée par des espérantophones. Accueil, dans le cadre d'une tournée nationale, de deux Japonais et organisation d'une soirée-débat sur Fukushima, avec plus de 100 participants. Interventions sur la langue espéranto à la MJC, au lycée Ernest Renan et à l'Université Organisation de deux stages espéranto de fin de semaine, avec 27 et 24 participants. Participation au festival des langues de Lannion (ENSSAT), au printemps des langues de Guingamp, à la foire bio *Biozone*. Projections du film *Espéranto* dans des salles de cinéma à Dinan et Saint-André-des-Eaux et au Foyer du jeune Travailleur de Dinan Sous-titrage en espéranto du film *Le petit jardin des écoliers*. Les jeunes qui pratiquent le woofing au « petit jardin des écoliers » participent aux cours d'espéranto.

Partenariat avec diverses associations (ESS, RESIA, Guide Europe)

À Plouézec, du 18 au 25 août, les 16es Rencontres internationales ont réuni 110 personnes d'une dizaine de nationalités. Membres d'honneur : le Népalais Razen Manandhar et le jeune Brésilien Igor Ferreira. 7 niveaux de

cours, tourisme, ateliers de théâtre, chant choral, yoga, informatique, jeux de société, dessins celtes, spectacles et concerts.

Les Chinois de Canton ont organisé en janvier 2012 un mois de stage intensif d'espéranto à l'île de Hainan et, à la suite de leur séjour aux rencontres internationales de Plouézec 2011, y ont invité les Bretons. Deux membres des Côtes-d'Armor y ont participé.

FINISTÈRE

Rencontre avec l'espérantiste et choriste gallois Bill Chapman à Châteauneuf-du-Faou.

Participation au salon multilingue du Livre Jeunesse à Pluguffan.

Participations aux actions de solidarité internationale dans le cadre du CICODES et de la Mairie de Quimper, à la Fête des Droits de Toutes les Couleurs à Quimper.

ILLE-ET-VILAINE

Participation à la Journée de l'Europe (9 mai) par une exposition et une conférence sur l'espéranto à l'Hôtel de la Communauté de Communes de Montfort-sur-Meu. Soirée-débat (24 mai) à Montfort sur la Pologne, avec la présence de plusieurs maires et représentants de comités de jumelage, et rencontre des espérantophones des clubs de Rennes, Montfort et Chartres-de-Bretagne avec le journaliste polonais Roman Dobzynski, dans le cadre d'une tournée nationale organisée par Espéranto-France. Mise en place d'un atelier théâtre par les jeunes étudiants rennais membres de l'association Espéranto-Rennes

Arrivée à Rennes d'un nouvel enseignant pour les débutants, Stéphane Blaovaet

À Saint-Malo, accueil et conférence d'un espérantophone Ukrainien.

MORBIHAN

Vannes

- Les 5 Journées de stage « Samedis espéranto » ont attiré plus de 80 personnes, avec 3 niveaux de cours et divers ateliers.
- L'activité théâtre a débouché sur une représentation lors de la Fête Zamenhof (janvier 2012), avec une soixantaine de spectateurs.
- Organisation de la « Litera Turo », concours international de Belles Lettres.
- Soirée-débat avec le japonais Hori jasuo (sur Fukushima) et accueil d'un espérantiste coréen.
- Participation au Forum Social de Séné

Hennebont

- Dans le cadre du jumelage avec la ville allemande de Kronach, accueil d'un espérantiste allemand pendant une semaine et visite de 2 espérantistes de Hennebont dans la ville allemande.
- Divers :
 - Présentation du film *Espéranto* dans des salles à Arzon et Saint-Gildas-de-Rhuys ;
 - Participation de nos membres à divers stages et congrès nationaux et internationaux ;
 - Nombreuses correspondances et échanges des élèves bretons avec des élèves du monde entier

En conclusion, l'accueil d'étrangers du monde entier dans nos clubs (Cubain, Brésilien, Japonais, Coréen, Népalais, Gallois, Allemand, Polonais...) et l'organisation chaque année des Rencontres Internationales à Plouézec permettent à nos membres de tisser des liens d'amitié et leur offrent une ouverture au monde incomparable.

5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

Jarraporto ne ricevita. Tamen ni proponas al vi legi raporton pri Kultura Esperanto Centro Gresillon.

5.4. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

La estraro de ESPERANTO FRANCE-EST ankaŭ ĉi-jare sukcesis funkciigi kontentige nian regionan asocion. Ĝi laŭeble helpis al nia eksprezidanto François Xavier GILBERT kun sia skipo organizi sukcesan **printempan staĝon** en Benoîte-Vaux, apud VERDUN. Tuj poste sin proponis Yves STUTZ je la nomo de Mulhouse-Espéranto por la printempa staĝo 2014 en Storckensohn, piede de la voĝo montaro.

Pol DENIS prizorgis plej fidele la aperigon de **LA INFORMILO**, sed bedaŭrinde li forpasis en novembro 2013. Kia perdo por Esperanto !

Jean-Luc THIBIAS plu prizorgas nian riĉenhavan **libroservon**, kies librojn li regule veturigas al nia printempa staĝo kaj al nia aŭtuna staĝo en Germanio, kie fidele deĵoras Micheline COLNOT.

La **perkorespondan kurson** de EFE bedaŭrinde uzis nur du personoj. Unu tre bone lernas. La gelernantoj lernas kaj verkas komputile kaj sendas la taskojn per la reto.

Pri la **retejo** de EFE daŭre zorgas nia senlaca kaj ĉionfaranta kasisto André GROSSMANN.

Jacques HERLÉ refoje organizis **budon** en la vilaĝo de la libroj Fontenoy-la-Joute, en Loreno. Pluraj komitatanoj partoprenis en prezento-budoj organizitaj de lokaj grupoj en Elzaso kaj en Loreno. Ne mallaboras la komitatanoj kaj la membroj en niaj regionaj grupoj, bedaŭrinde malfacilas aliĝigi novajn membrojn.

Nur 88 homoj membras en EFE, sed 136 estas abonantoj de LA INFORMILO. Sciatas tamen, ke ekzistas izolitaj esperantistoj kaj klubanoj, kiuj ne membras. Ĉu regiona asocio ne plu necesas ????

Edmond LUDWIG (prezidanto) kaj Roberto KUENY (sekretario)

5.5. Fédération Espéranto-Île-de-France (Francilio)

5.5.1. Administrado

5.5.1.1. Membraro

Membro de la federacio: 137

Nombro de lokaj asocioj kaj kluboj: 8 (Asnières (92), Boissy-sous-Saint-Yon (91), Bondy (93), CCEP (75), Épinay (93), Esperanto-94, GAE 95, Espéranto-Val-de-Seine (77), ILO Châteaufort (78))

5.5.1.2. Komitato

Sekve de nia ĝenerala asembleo okazinta la 23an de marto 2013 en Moret-sur-Loing (77), nia komitato konsistas el:

- mandato ĝis 2014 : Emmanuelle Richard, Pascal Léclaircie, Daniel Micheneau, Cyrille Poulet, William Dumoulin
- mandato ĝis 2015 : Michèle Abada-Simon, Jean Delhomme, Aleks Kadar, Olivier Maury, Kévin Morel-Fourrier
- mandato ĝis 2016 : Abdel Nouri, Jean-Louis Poulet, Didier Loison, Sylviane Lafargue, Didier Janot

Dum sia komitatkunsido okazinta la 3an de junio 2013, la komitato elektis la estraron:

Didier Janot, prezidanto ; Didier Loison, vic-prezidanto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France ; Jean Delhomme, kasisto ; Olivier Maury, sekretario.

Aleks Kadar fariĝis 2a vic-prezidanto okaze de la komitatkunsido de la 2an de septembro 2013.

Dum la komitatkunveno de la 2an de decembro 2013, Jean Delhomme anoncis, ke post sep jaroj kiel kasisto, li deziras liberiĝi je tiu laboro. Didier Loison akceptis repreni la torĉon kun helpo de Jean Delhomme ĝis la venonta ĝenerala asembleo. William Dumoulin ankaŭ sinproponis kiel estraron. La komitato renovigis la estraron jene: Didier Janot, prezidanto ; William Dumoulin, vic-prezidanto, Aleks Kadar, vic-prezidanto ; Didier Loison, kasisto kaj reprezentanto ĉe Espéranto-France, Jean Delhomme, vic-kasisto, Oliver Maury, sekretario.

Ĉijare (2014) ni elektos 5 komitatanojn por anstataŭigi aŭ daŭrigi la 5 komitatanojn kies mandato finiĝas en 2014. Notinte ke se nia nova statuto estas akceptita, ĉiuj komitatmandatoj finiĝos en 2015 kaj ekde tiu jaro ni renovigos la tutan komitaton ĉijare.

5.5.1.3. Sidejo

Pluraj bonvolemluloj de nia federacio helpas ĉe la Ĉerizejo pri diversaj taskoj de Espéranto-France. Kelkaj bonvolemluloj zorgas la funkciadon de nia federacio.

5.5.2. Agadoj

5.5.2.1. Forumoj de asocioj kaj malfermaj pordoj

En septembro, en multaj urboj okazas forumo de asocioj. Ni partoprenis en Parizo 4a distrikto, Asnières, Choisy-le-Roi, Épinay-sur-Seine kaj Vaux-le-Pénil.

Kiel pasintan jaron, okaze de la eŭropa tago de lingvoj, ni organizis Malfermajn Pordojn de nia federacio la lastan semajnfino de septembro.

5.5.2.2. Prelegturneoj kaj vizitoj

Dum la jaro, la federacio ricevis plurajn prelegantojn :

01/02 Mikaelo Bronstein (turneo organizita de Espéranto-France), en la MDA 04
24/05 Andrej Grigoriev, partopreno al la Stranga ideujo, pri inventaĵoj (turneo de Espéranto-France),
20/08 Onia el SudKoreio
31/08 Ryan LORTIE kaj Tiffany ANTOPOLSKI el Toronto
19/09 Bruno Robineau, en la MDA 04
29/11 Ĝoja, de Ĉina Radio Internacia (turneo organizita de Espéranto-France), en la MDA 04

5.5.2.3. Café Espéranto

19/1, 6/3, 30/4, 24/5, 2/7, 19/9, 25/10, 13/2 (kino, koncertoj, pikniko, ...)

5.5.2.4. Polyglot club

Dum la eventoj de Polyglot club, sabate, ateliero estas gvidata ekde 21a30 por konigi Esperanton kaj prezenti la bazojn de la lingvo. Pliaj detaloj ĉe <http://francilio.org/esperanto-au-polyglot-club>.

Aliaj agadoj:

06-09/02 Partopreno al la lingva foiro Expolangues
08/05 Eŭropa festo en Montreuil-sous-Bois (budo + koncerto de Platano) ; Esperanto-budo ĉe la urba programo
07/09 *Revoluciklo en Bastille*: komuna biciklado kun tiu organizo
26-28/9 Projekciado de dokument-filmo *Esperanto* en la *Maison des Associations du 4e arrondissement*
07/12 Zamenhof festo organizita de la fervojistoj, kiuj prezentis du teatraĵojn kaj invitis plurlingvan virinan koruson.

La federacio subvenciis kaj pluraj membroj ĉeestis.

5.5.3. Instruado - Ekzamenoj

5.5.3.1. Kursoj 2012/2013

- Komencantoj: Michèle Abada-Simon (lunde, 4 kursanoj)
- Progresantoj: Axel Rousseau, William Dumoulin (vendrede, 6 kursanoj)
- 3a nivelo: ne okazis
- Ekzameno-preparado: 6 personoj

5.5.3.2. Babilrondoj

- Por progresantoj, ĉiun mardon de la 18a ĝis la 19a30, organizata de Didier Janot
- Stranga IDEujo, ĉiun jaŭdon de la 18a ĝis la 20a, organizata de William Dumoulin kaj Michèle Abada-Simon (francilio.org/Diversaj-kreivaj-agadoj).

5.5.3.3. Staĝoj

Dufoje okazis semajnfinaj staĝoj por komencantoj (francilio.org/stage-esperanto), gviditaj de Michèle Abada-Simon: sume 8 staĝantoj

5.5.3.4. Ekzamenoj

De februaro ĝis aprilo okazis trejnsesio por la KER ekzamenoj (B1-B2-C1).

La 8an de junio, en Parizo, 9 kandidatoj trapasis la skriban parton de KER ekzameno el kiuj 8 sukcesis.

B1 : 3 el kiu 2 sukcesis. B2 : 2/2. C1 : 4/4.

5.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

Grupo de Béziers

La klubo ricevis Mikael Bronstein kiu prelegis pri festoj en Rusio (kadre de la turneo).

Kelkaj membroj partoprenis je la nacia kongreso en Artigues kaj je la universala kongreso en Reykjavik.

Du membroj sukcesis en la KER-ekzameno.

La klubo vendrede kunvenas en la asocia domo, kelkafoje ĉe unu membro.

Dum ferioj, ni ordenis nian bibliotekon.

La grupo organizis la federacian zamenhofan tagon; anoj de Montpellier kaj Nîmes venis kaj ŝatis ludojn kaj spektaklojn. La klubo partoprenis la asocian forumon en Béziers.

Grupo de Montpellier

La klubo marde kunvenas (parolantoj) kaj ankaŭ unu sabaton monate.

Ĝi jaŭde organizas kurson por komencantoj ; 6 junuloj sukcesis la unuan nivelon (ILEI).

La grupo organizis 2 prelegojn kun Thierry Saladin.

Kelkaj membroj partoprenis la SAT kongreson en Madrid kaj la Someran Esperanto Studadon Slovakie.

La klubo partoprenis la asocian forumon en Montpellier.

Grupo de Nîmes

La grupo partoprenis la asocian forumon en Nîmes. Ĉi jaron, 5 personoj aniĝis kaj nun sekvas kursojn.

La klubo organizis tri nivelojn :

- lunde por komencantoj ;

- merkrede por la dua nivelo ;
- sabate por parolantoj : la partoprenantoj tradukis *On a marché sur la Lune* (Tintin) en esperantan lingvon : *luj paŝis sur la Luno* (Tinĉjo).

Interreto : esperantonimes.wordpress.com

Lozera grupo

La asocio Espéranto-Lozère naskiĝis la 8-an de oktobro 2013 en Mende. Temas pri areto, kies membroj decidis kunveni ĉiudusemajne por paroli pri kaj en esperanto. Ĉefa celo estas kompreneble lerni la lingvon. Tial dum la unua horo okazas ia “ateliero” – ne vera kurso – en kiu la 7-8 gepartoprenantoj vigle lernadas la lingvobazojn. Dum la dua horo, ni interparolas pri Esperanto kaj projektoj.

Ekde januaro, ni prizorgas krome radiodissendon el Radio-Bartas, loka radio de la urbeto Florac. Jam okazis intervjuo (la 8-an de januaro), dum kiu ni rapide prezentis la lingvon kaj anoncis nian “agadprogramon”, nome la monatan dissendon *Esperantolando*. Interese ŝajnas la ebleco tutmonde aŭdigi per interreto pri surloke esperantistaj aktivaĵoj.

Cetere ni jam havas kontaktojn kun grupo en norda Germanio (Neubrandenburg) kaj antaŭprojekto pri kunlaboro kun kubanaj samideanoj. Tamen, por efektiviĝi ĉion, ni unue ellernadu la bazojn, kiel jam skribite...

Laŭ siaj statutoj, Espéranto-Lozère estas sendependa asocio, do ne aliĝos al iu regiona, nacia aŭ internacia reto. Tamen ĉiu membro liberas decidi mem, ĉu ŝi/li deziras aliĝi persone ekz. al regiona federacio.

Ĉiuj informoj prie disponeblas en nia eta retpaĝo <http://esperanto.lozere.free.fr> . Krome ni ĉeestas en la oficiala (jes!) retejo de la urbo Mende, kie videblas nia agendo pri estontaj aktivaĵoj: <http://www.mende.fr/associations/2062-esperanto-lozere.html>

5.7. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sud-Pireneoj)

5.7.1. Regiona kunordigado

La membraro iomete kreskis de 109 ĝis ? (12 el CEEA, 96 el EKC, kaj ? individuaj membroj de ufe, sed deko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono).

Nia jarkunsido okazis la 14/12/2012 en Foix, okaze de la Zamenhof-festo. Partoprenis 12 personoj, el 3 departementoj. La asocio ne estis reprezentata dum la 3 ufe-komitatkunvenoj de 2013.

Pri Tarn Esperanto, okazis Jarkunveno por revivigi la asocion en oktobro. Michel Raportos. Tarn Esperanto iĝis Esperanto Tarn, kaj kunsidas nun en Lavaur, kun 5 esperantistoj de Lavaur. Ili projektas fari kurson en Lavaur, ankoraŭ ne trovis taŭgan lokon. Ili ankaŭ planas partopreni al “biocybèle” kaj aliaj asociaj forumoj.

Pri Laborgrupo, ne sukcesis labori laŭ la plano kaj ne finis la laboron. Raportos la ĉeestontaj membroj dum la jarkunsido.

5.7.2. Informado kaj komunikado

Nia asocio havas informbultenon kaj retejon. Aperis nur unu numero (januaro) de la *Cirkulero de Midi-Pyrénées*, interna bulteno, sendita kutime rete (papere al tiuj sen retadreso). Tiu ĉi estis sendita al ĉiuj membroj, kune kun *la Krokodil'* de EKC, nia asocio pagis por la printado, EKC por la sendo.

Niaj retaj paĝoj kuŝas nun en la portalo de Esperanto en Midi-Pyrénées. Estas paĝoj pri la federacio, paĝoj laŭ departamento, komunaj paĝoj kaj aparta blogo por la Cirkulero.

En la cirkulero, publikiĝis deko de artikoloj en 2013. Marion respondecas pri ĝi. La adreso estas <http://Esperanto-midipyrenees.org>

Nia Ekspozicio de 12 paneloj *Diversité des Langues et Espéranto* estas unufoje jare uzata de André Andrieu en Aveyron kaj nuntempe kuŝas tie. La lokaj asocioj prizorgis standojn en diversaj manifestacioj:

- Forumoj de Lingvoj kaj de asocioj en Toulouse (10), Ariège, Aveyron, kaj Tarbes.
- Organikaj foiroj (Tarn, Montauban, Toulouse, Muret)
- Libro-foiroj en Aveyron.
- Lernejoj (en Ariège kaj en Aveyron), Universitato (Toulouse).

Okazis 2 « Ateliers de decouverte » en Auterive kaj Revel kaj fulma prezento al centoj da studentoj de IUT.

Radioelsendoj pri esperanto okazas regule en Toulouse, tamen ne dum kelkaj monatoj printempe. Marion ekde septembro zorgas pri ĝi preparante la elsendojn hejme.

Ankaŭ regule okazas elsendoj en Villeneuve-d'Aveyron pri kiuj zorgas André Andrieu. La elsendoj de Toulouse povas esti interrete aŭskultataj ĉe <http://canalsud.net>, tiuj de Villeneuve ĉe <http://cfmradio.fr>.

Projekto de Christophe por konigi esperanton en la departementoj sen asocioj. Malkovro-metiejo en Kadurko La Junul-Kultur-Domo de Kadurko refoje akceptis la proponon de Christophe animi metiejon por malkovrigi Esperanton en ilia lokalo, la 25an de majo 2013. La nombro de partoprenantoj estis modesta (4 personoj) sed la interŝanĝoj interesaj. La direktisto proponis refari intervenon parolante pri la eblo aranĝi unutagan staĝon por komencantoj. Tiu staĝo estas okazonta en marto 2014. Informo-stando en la organika foiro de Montauban Biosynergie okazis la dimanĉon 22an de septembro. La ĉeesto de nia stando estis tre rimarkita danke al kakemono lokita ĉe unu el la ĉefaj cirkulvojoj, proksime de la trinko-budo.

Okazis du publikaj inicoj ĉe la stando, matene kaj post-tagmeze (6/7 partoprenantoj), kaj lasis sian kontakton pluraj personoj. Loka korespondanto de la revuo *Silence* lasis sian karton proponante ke ni rekontaktu lin por provi aperigi artikolon. Repago de kostoj entute el la provizitaj 250 € de 2 jaroj Christophe elspezis por tiuj du agoj 118,17 €

5.7.3. Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj regule okazas iniciate de lokaj grupoj : Tuluzo (du sessemajnaj kursoj), Auterive (1 ses-semajna kurso), Ariège? (Mirepoix, Laroque-d'Olme, Foix, Verniolle (dufoje monate), 1 kurso en Hautes Pyrénées (ĉiusemajne en Bagnère-de-Bigorre aŭ Tarbes).

Gvidata memlerna kursoformulo nomita « formation Lernu » (distance + kolektiĝo) estis starigita de EKC kun 14 partoprenantoj dividitaj laŭ du niveloj. La plimulto el ili loĝis ekster Tuluzo, en 3 departementoj (Tarn, Tarn-et-Garonne kaj Haute-Garonne). La bilanco estas duonbona (multaj rezignoj, precipe je la porkomencanta nivelo) sed la formulo ŝajnas tamen promesoplena, se oni plibonigas ĝin. Tri semajnfinaj kursoj okazis sukcese en Arrout (Ariège), organizitaj de EKC (inter 18 kaj 25 partoprenintoj). Unu tuttaga kurso por komencantoj okazis en Revel (EKC). EKC organizis KER ekzamenon, samtempe kiel en 28 urboj kun homoj de la tuta regiono kaj unu el Béziers. (Estas de nove planita tutmonda ekzameno la 17-an de majo 2014).

5.7.4. Kulturo kaj aranĝoj

La tradicia Zam'festoj (13 et 14/12) kunvenigis kvindek da esperantistoj el la regiono en Foix, por festmanĝo, foiro de asocioj, libroservo, koncerto de Vjera. Koruso staĝo en La Bastide-sur-l'Hers (Ariège). En marto. La CEEA organizis sian tradician 19-an korusosemajnon, sub gvido de la bulgarino Zdravka Lepne, kun 25 partoprenantoj.

- Turneo de Eddy Raats : prelego en Tuluzo en oktobro 2012
- Turneo de Mikhael Bronstein : Januaro (Koncert prelego en Tuluzo, kaj diversaj aranĝoj en Ariejo)
- Koncerto de Karmen en novembro 2013 en Lavelanet (CEEA)
- Turneo de Ĝoja : en novembro (pluraj aranĝoj en Ariège kaj en Auterive (31)
- Prelego pri SAT en novembro kun Robin' en Tuluzo (EKC) kadre de *Semaine de la solidarité internationale*
- Regulaj renkontiĝoj por praktiki la lingvon en Tuluzo, (Lingva Kafejo, manĝo-klaĉoj...), kaj babilmanĝoj en Ariège, Auterive kaj Tarn.

Raportis Marion Quenut

5.8 Esperanto Norda Federacio

5.8.1. Regiona kunordigado

Membraro (kluboj, individuoj) kaj evoluo:

- Arras-Espéranto: 21
- Somme-Espéranto: 18
- Boulogne-Espéranto: 4
- Dunkerque-Espéranto: 13
- Lille-Villeneuve-Espéranto: 23
- Valenciennes-Espéranto: 16
- Izoluloj: 8

Entute nia federacio nombras 103 membrojn (118 en 2012).

Du elstaraj membroj el nia federacio forpasis en 2013: Nicole Bécant kaj Lilli Giloteaux.

Federaciaj kunsidoj, kongresoj

Nia federacia komitato kunsidis trifoje en 2013: la 6an de Aprilo, la 16an de Aprilo kaj la 16an de Novembro. Kongreso okazis la 16an de Aprilo en Halluin, kun ĝenerala asembleo, komitatkunsido kaj prelego-koncerto de Guillaume Armide.

Rilatoj kun UFE

Pluraj federacianoj membriĝas en la diversaj instancoj de UFE. Claude Longue-Épée reprezentas tie nian federacion.

5.8.2. Informado kaj komunikado

Nia federacia gazeto, la Norda Gazeto, aperis trijofe. La skipo efike kaj bonege kunlaboras, kun Claude Longue-Épée kiel ĉefredaktoro, Cyrille Découture kiel enpaĝiganto, Claude Longue-Épée kaj Pascal Vilain kiel korektantoj, kaj France kaj Richard Valet por presado, enkovertigo kaj sendado.

Nia dulingva federacia retejo ankaŭ konsultebblas: <http://www.esperanto-nord.org/>

Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)

Michel Dechy, prezidanto de nia federacio, partoprenis en la prikultura semajno de la kolegio Saint-Exupéry de Hellemmes en aprilo. Kiel lastan jaron, la bazaj lernejoj Anatole France kaj Picasso invitis Michel Dechy, kiu proponas tri prelegojn (prezentado, matematika kurso en Esperanto, sorobano en Esperanto). Ĉi-jare, okaze de la eldono de nova *Tinĉjo*, la televido ĉeestis dum la unua leciono en Picasso, kaj aperis raporto ĉe la televidkanalo France 3. Sama prezentado de Esperanto okazis en la lernejo Verhaeren, kaj en la liceo Marguerite de Flandre.

En la urbo Lens ankaŭ okazis prezentado de Esperanto al du gimnaziaj klasoj. Niaj diversaj kluboj partoprenis en Forumoj pri Asocioj (Arass, Villeneuve-d'Asq, Valenciennes, en Festivaloj de lingvoj (Lille, Dunkerque kaj aliaj kulturaj aranĝoj (Salon du livre en Coudekerque-Village apud Dunkerque, kaj en Arras, Festivalo de la bildstrio en Lys-les-Lannoy, prezentado de Esperanto kadre de *Arras Solidarité internationale*. Michel Dechy plurfoje prelegis: en Roubaix laŭ organizo de Union Rationaliste Métropole Nord, en La Bassée kaj Mouvaux (invitite de *Nord Madame*).

5.8.3. Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj:

Diversaj kursoj estas organizitaj de niaj kluboj (komence de la lerneja jaro 2013-2014) :

- Dunkerque: 3 komencantoj, 6 progresantoj
- Valenciennes: 3 komencantoj, 4 progresantoj

- Arras: 18 partoprenantoj
- Villeneuve-d'Asq: 8 komencantoj kaj komencintoj
- Bersée: 7 progresantoj-komencintoj
- Lille: 4 progresantoj en la kvartala urbodomo de Lille-Centre, kaj 2 komencantoj en la Universitato pri Libera Tempo
- Oignies: konversacia rondo kun 3 membroj, ĉiun merkredon posttagmeze

Someraj staĝoj estis organizitaj de Lille-Villeneuve-Espéranto julie kaj aŭguste.

Federaciaj ekzamensesioj, nombro da ekzamenitoj

Nia federacio organizis ekzamensesion la 23an de junio 2013 en Lille, kun 9 kandidatoj je la unua nivelo, inter kiuj du ankaŭ trapasis la duanivelan ekzamenon. Malsukcesis nur unu kandidato je la unua nivelo.

KER-Eksamensesio

La 8an de junio estis organizita en Arras ekzamensesio. Eblis trapasi kaj la skriban parton, kaj la parolan parton. Sukcese partoprenis 17 kandidatoj.

5.8.4. Eŭropa rendevuo en Stella-Plage

Nia federacio organizas ĉiujare Eŭropan Rendevuon, kaj en 2013, la 25a rendevuo okazis kvaranfojon en Stella-Plage. Ĝi estis granda sukceso dank'al la entuziasmoplenaj organizantoj, Arlette Plutniak, kaj ŝia edzo Edmond. Partoprenis 82 homoj el 9 landoj. Katalin Kováts gvidis La laborgrupon por la komencantoj, Michel Dechy gvidis konversacian rondon pri *Tinĉjo*, Anne Jausions malkovrigis al ni la nuntempan esperantan literaturon, kaj Franjo Lévêque gvidis atelieron pri kantado. Belega koncerto de Guillaume Armide okazis sabate vespere. Dimanĉe matene promenadoj kaj vizitoj estis organizitaj, kaj dimanĉe posttagmeze ni celebris la jubileon de la Nordfrancia aranĝo.

5.8.5. Kulturo kaj aranĝoj

Ludvesperoj, distraj sabatoj En Lille estis organizitaj unufoje monate ludvesperoj en Le café citoyen. Inter 8 kaj 10 partoprenantoj renkontiĝis kaj babilis en Esperanto pere de paroligaj ludoj.

En Salouël apud Amiens rendezuas ĉiun duan monaton esperanto-parolantoj por pasigi agrablan momenton pere de ludoj, kantoj, fabeloj...

Prelegoj, prelegeturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj

Mikaelo Bronstejn turneis en Francio kaj prelegis en Amiens kaj en Lille. La samaj kluboj ankaŭ havis la ŝancon bonvenigi Petron Chrdle(n) kun Milada Broumova, kaj la ĉinan ĵurnalistinon Zhang Ping (Ĝoja).

En 2012 okazis pluraj ĝemelklubaj renkontiĝoj: la dunkirka klubo partoprenis renkontiĝon kun la klubo de Bruĝo en Belgio, kaj klubanoj el Dunkerque vizitis Esperantistojn de la klubo Krefeld-Esperanto (Germanio), (ĝemelita kun Dunkirko). Esperantistoj el Valenciennes, renkontis la grupon de Solre-sur-Sambre (36a jara renkontiĝo!), La Amienanoj renkontis Esperantistojn el Dortmund, kaj pluraj membroj de LVE partoprenis en la Tago de la Flandraj Ardenoj, invititaj de niaj flandraj amikoj.

La klubanoj de Dunkerque festis la Zamenhofan Feston per vespermanĝo en restoracio, aliaj federacioj partoprenis Zamenhofajn festojn en Belgio.

En Aprilo okazis la inaŭguro de la strato Zamenhof en Beuvrages, apud Valenciennes, kun partopreno de 50 samideanoj.

Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj : Pluraj federacioj partoprenis en la UFE kongreso, en PSI (Printempa Semajno Internacia) en Germanio, en la universala kongreso en Rejkjavik (Islando).

5.8.6. Perspektivoj

Lille 2015

La instancoj de UEA elektis nian urbon Lille por organizi la 100-an jubilean UK-on. Tio estas kompreneble nia plej grava perspektivo kaj defio por la du venontaj jaroj. En Septembro, Clay Magalhaes, konstanta kongresa sekretario de UEA revizitis Lillon, kaj komence de Decembro kvin federaciaĵoj partoprenis organizan kunvenon en Parizo.

Redaktis la sekretariino Katja Boen

5.9. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes

(Jara Raporto ne ricevita sed ni ricevis raporton de Bouresse, la plej grava Esperanto-centro en la regiono)

5.10. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

Membraro :

La Esperanto-Provenco Federacio havis 68 membrojn je la 18/12/2013.

13 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj :

04 : Manosque kaj Villeneuve ; 05 : Gap ; 06 : Nice, Cannes ; 13 : La Ciotat, La Roque d'Anthéron - Miramas, Marseille ; 83 : Fréjus-St Raphaël, Toulon, Le Beausset ; 84 : Avignon, Carpentras, Orange.

Administro :

Membrokunveno okazis en les Issambres la 10 an de Marto 2013 komence de la M.E.S.- renkontiĝo.

Elekto de Komitatanoj :

Arnaud Monique ; Cerisay Michel ; Demongeot Claudie ; Mimmersheim Franz ; Oliva Pierre ; Spanjaart Thierry ; Triolle Renée ; Pascal Vilain ; Wallez Gilles

Prezidanto : Pierre Oliva

Vic-prezidanto : neni

Sekretariino : Monique Arnaud

Help-sekretariino : Claudie Demongeot

Kasisto : Michel Cerisay

Respondeculoj pri bulteno : Pascal Vilain / Bernadette Deschanel

Rilatoj kun Espéranto-France : Monique Arnaud / Gilles Wallez

Informado, Komunikado :

La federacio plu eldonas sian trimonatan bultenon : « Espéranto-Provence ». Unu klubo eldonas propran bultenon.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj :

- Tago de la Patrino Lingvo: laŭ iniciato de UNESKO, la 21a de Februaro estas dediĉita al la patrinaj lingvoj, la lingvo en kiu ĉiu homo strukturigas sian penson kaj malkovras la mondon.

- Pro ferioj de nia regiono, Monique Arnaud vizitis 2 mezgradajn lernejojn apud Grenoble.

- Virina Tago la 8an de Marto : kiel kutime en La Ciotat, budo pri du elstaraj verkistinoj (rusa kaj nederlanda), informado kaj partopreno en la diskutoj.

- Kiel anoncote en la vintra numero de nia bulteno, okazis Esperanta semajno en la Manoska turismoficejo, de la 18a ĝis la 23a de Marto.

- Jaŭdon la 23an de Majo 2013, EKEM-04-Esperanto prezentis Esperanton al lernantoj de la Internacia Lernejo de Manosko, kaj ankaŭ en la lernejo « Lycée Esclangon » en Manosko la 20 an de Septembro okaze de la Festo de la Paco.

- En Gap okaze de la Festo de la Paco dimanĉon la 23an de Junio en la Parko de Charance.

- En Ste Tulle la 29 an de Junio okaze de la Festo de la Solidareco.

- En Embrun la 7an kaj 8an de Septembro okaze de Foiro Généri.

- **Forumo de Asocioj** : pluraj kluboj starigis budon en diversaj lokoj : Espéranto-Marseille dimanĉon la 8an de Septembro de la 10a ĝis la 17a en Parko Borely ; sabaton la 14an de Septembro en Le Beausset (83) ; la 14an kaj 15an de Septembro en Fréjus.
- « Fête des Places » en La Ciotat (13) la 12an de Oktobro, kaj dum la jaro aperas regula informo pri la klubo en la gazeto de CIQ, Maison des Associations.
- En Tulono, F. Noireau regule ĝisdatigas perretajn anoncetojn pri kursoj de la lingvo Esperanto.
- En CEA – Cadarache, ekspozicio estis videbla dum unu semajno fine de Novembro kaj artikolo pri Esperanto aperis en la entreprena bulteno.

Instruado kaj ekzamenoj :

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj iniciatajn staĝojn en klubejoj, lernejoj.

La 8an de Junio en Avinjono, 8 klubanoj trapasis la KER-ekzamenojn : 5 sukcesis la B2 kaj 3 la B1 (skriba parto por ĉiuj). En Grésillon, 1 sukcesis la kompleksan B2. Gratulojn al ili !

Kursoj, instruado :

- En Marseille, regula semajna kurso (konversacio) en CIRA kaj en La Domo de Asocioj.
- En La Ciotat, regula semajna kurso en CIQ-Fontsainte, je dua nivelo ĉar mankas novuloj.
- La planita intensiva staĝo en La Ciotat la 5an kaj 6an de Oktobro ne okazis pro manko de kandidatoj.
- Semajnfina staĝo la 30an de Novembro kaj 1an de Decembro 2013 en Le Beausset kun 28 partoprenintoj, 3 kursniveloj.
- Kursoj en Manosko la 1an kaj 3an merkredon de la monato.
- Sabaton 17an de Marto, tuttaga staĝo en la Domo de la Asocioj en Manosko.
- Dum la jaro 2013 ne okazis kurso en Gap.
- En St Raphaël, 7 homoj vizitis la kurson, kiu okazas lunde posttagmeze.
- La klubo Fréjus – St-Raphaël organizis M.E.S, unusemajnan staĝon ĉe la marborbo en Les Issambres, en Marto. Partoprenis multaj eksterlandanoj.
- Kursoj por komencantoj en Le Beausset.

Kulturo kaj aranĝoj, kultura agado kaj prelegvojaĝoj :

- Festo de la Tri Reĝoj okazis en diversaj lokoj : 83 - Esperanto-Klubo de Fréjus - St-Raphaël, samtempe kun ĝenerala membro-kunveno ; 83 - Le Beausset la 9an de Januaro ; 13 - Espéranto - La Ciotat
- **Nova klubo** estis kreita en **le Beausset** - 13an de Januaro 2013 kaj la respondeculoj proponis ekspozicion de la 1a ĝis la 9a de Februaro. La inaŭguro de ĉi tiu evento kunigis dudekon da personoj vendredon 1an de Februaro, en la ĉeesto de reprezentantino de la urbestro. La 6an de Februaro, en la kultura centro « Pôle Saint-Exupéry », okaze de la ekspozicio, Alain Rémy raportis pri sia antaŭlasta vojaĝo al Ĉinio, Usono...
- **jOmO** kantis en La Ciotat, invitita de Espéranto-la Ciotat, mardon la 26an de Februaro je la 20.30 en la Théâtre du Golfe. Estis granda sukceso, tre bona etoso !
- Vizitintoj en Le Beausset, fine de Julio : Nicole kaj Pierre Oliva gastigis Jozefo-n kaj Maria-n Trnka el Hungario.
- **Vizito de Milada kaj Petro Chrdle**, kiu kunportis dekojn da libroj "Comme un vol d'oiseaux sacrés". Niaj eksterlandaj geamikoj alvenis en Le Beausset la 15an de Junio.
- En Les Issambres (Val D'Esquières, la MES-ejo) fine de Junio okazis komuna manĝo kun la klubo « Fréjus - St-Raphaël » por festi la finon de la lerno-jaro.
- **Prelegturneo de Franciska Toubale** kiu vizitis nian federacion dum unu semajno. Unue estis akcepto kaj publika prelego pri « Aborigenoj kaj migrintoj en Aŭstralio : sama batalo » ; 2 artikoloj kun foto en la lokaj gazetoj en Marsejlo kaj La Ciotat. 22a de Septembro en Aix-en-Provence (13) ; 23a : Marseille (13) ; 26a : Manosque (04) ; 27a : Gap-Saint-Bonnet (05)

Okaze de la Tago de la Eŭropaj lingvoj, okazis vizitoj al mezgradaj lernejoj en Ste-Tulle (04) kaj en St-Bonnet (05). Franciska prezentis la etnan radion de Melburno « 3ZZZ », kiu elsendas programon en 68 lingvoj ; inter ili : Esperanto ! Aperis artikolo en la Gazeto « Le Dauphiné Libéré ».

- Multaj federacianoj partoprenis en Esperantaj kongresoj aŭ renkontiĝoj (francaj kaj eksterlandaj) kaj staĝoj : ses Provecanoj partoprenis en la nacia kongreso en Artigues apud Bordojo kvar en la U.K.-o en Islando unu en la itala kongreso en Kastelaro (kaj aperigis prian artikolon en la loka gazeto « Le Dauphiné Libéré »)

- Zamenhof-Tago en St-Raphaël kun trideko da partoprenantoj ; bonega artikolo en la loka gazeto.
Zamenhof-tago ankaŭ en Avinjono

Biblioteko : daŭra disponigo al la klubanoj de libroj kaj gazetoj en Esperanto.

Venontaj projektoj ; eksteraj rilatoj :

- Mediteranea Esperanto-Semajno, en les Issambres (83), de la 8a ĝis la 15a de Marto
- Membrokunveno en Aix-en-Provence, la 6an de Aprilo, en la Domo de la Naturamikoj
- Nacia Kongreso, en Chambéry, la 31an de Majo / 1an de Junio 2014

Raportis Monique Arnaud.

5.11. Fédération Espéranto-Rhône-Alpes (Rodanalpo)

5.11.1. Regiona kunordiga

Nia regiono enhavas 200 membrojn, ĉirkaŭ 70 lernantojn (60 plenkreskuloj, 10 infanoj) en 13 asocioj : Lyon (CERL), Saint-Étienne, Albertville, Espéranto 74 (Annecy), Tarenteza Esperanto (Moûtiers), Bourg-en-Bresse, Châtillon-sur-Chalaronne, Espéranto Vive (Chambéry), Espéranto 38 kaj Espéranto Grenoble, Nova Stelo (Valence), Bona Stelo (Romans).

Ni rimarkas ĝenerale ke grandaj urboj pli facile sukcesas en la varbado por la internacia lingvo. Ĉiusemajne, tri Personoj venas de Nyons ĝis Romans por lerni Esperanton kaj ni povas esperi ke postan jaron estos malgranda klubo en Nyons. La kluboj havas rilatojn inter si : Saint-Étienne partoprenis en konferencoj en Lyon, kaj Romans manĝas ĉiujare kun Valence. Hannes kaj Gisèle Larsson prelegis en Lyon. Monique Arnaud el Provence prelegis kaj instruis en Moûtiers kaj en Grenoble pri traduko, Moûtiers kaj Albertville renkontiĝas ĉiudumonate por vespera babilado kaj manĝo kaj okazigas kunajn agadojn.

En junio 2012 dum tri tagoj, la regiona kongreso estis komuna kongreso kun la provenca regiono en Romans okaze de la centa datreveno de la klubo de Romans. Agrabla sed malgranda kongreso : nur 70 ĉeestantoj (antataŭ 70 nur por la rodanalpa regiono dum la aliaj regionaj kongresoj). La kaŭzo eble estis ke la urbestro malfrue ŝanĝis la datojn de la kongreso (li senpage pruntedonis al ni la salonojn) pro la balotoj. Dum tiu kongreso okazis pluraj prelegoj : René Triolle en la Franca cele al la neesperantista publiko parolis pri grandaj virinoj en la Esperanto-movado, Patrick Lagrange parolis kaj gvidis debaton pri nuklea energio, Arno Lagrange prelegis pri Tibor Sekejl. Okazis atelieroj, aŭkcio profite al la benina asocio "Scioj sen bariloj", libroservo. Ambaŭ ĝeneralaj asembleoj okazis dimanĉe matene. La teamo de Romans bone zorgis pri tiu kongreso, kies kulmina momento estis la oficiala akcepto en la Urbodomo.

5.11.2. Informado kaj komunikado

Rete, oni povas trovi la vivon de la esperanta movado en nia regiono, danke al la federacia retejo kaj la dissendolisto. Oni povas bedaŭri, ke ne ĉiuj asocioj uzas tiujn servojn.

La kluboj partoprenas en asociaj tagoj, forumoj, lokaj festagoj por paroli pri Esperanto (ĉefe "salon Primevère" en Lyon). Por helpi la komunikadon dum la salonoj, la federacio disponigas tri rulpanelojn, kiuj restadas en Saint-Étienne. Esperanto 38 regule kursas en lernejo en Saint-Égrève kaj malregule organizas atelierojn en mezgrada lernejo en Fontaine, kaj Rolande Cleizergues (Albertville) en infancentro.

La kluboj estas informitaj de la landaj kampanjoj kaj la membroj subskribas kaj subskribigas la peticiojn. En Bourg-en-Bresse Jean-Louis Gayet delonge partoprenas en loka radio elsendo ĉiujn du semajnojn.

Fédération Espéranto Rhône-Alpes – siège social : kotopo, 14 rue Leynaud, 69001 LYON
Prezidanto : Philippe Pellicier, chemin de la Chenat 73260 Saint-Oyen – tel. 04 79 01 14 69

5.11.3. Instruado kaj ekzamenoj

Preskaŭ ĉiuj kluboj havas unu aŭ du nivelajn kursojn por ĉirkaŭ 70 malnovaj aŭ novaj lernantoj. Tiujare, okazis tri regionaj unutagaj staĝoj por progresantoj de suface bona nivelo (inter dua kaj tria grado) en Albertville, Lyon kaj Lajoux (Jura).

La 9an de junio, 37 esperantistoj sukcese trapasis la ker-ekzamenojn (el 39) en Lyon aŭ en Fontaine okaze de la tutmonda ker-ekzamotago. Tio estas en Francio kaj eĉ mondscale, granda sukceso.

5.11.4. Kulturo kaj aranĝoj

Turneoj

Alexandre Melnikov prelegis en Lyon.

Renato Corseti kaj Anna Löwenstein prelegis en Lyon (20 esperantistoj, 10 ne-esperantistoj) kaj en Grenoble – pere de la asocio Les amis du monde diplomatique. Ili disdonis la KER-diplomojn en Bourg-en-Bresse, Fontaine (ĉirkaŭurbo de Grenoble) kie Anna Löwenstein instruis en lernejo.

Roman Dobrzynski prelegis en Grenoble.

La CERL de Lyon, tiun jaron, havas katalunan kaj ĉeĥan membrojn, akceptis Nepalanon. Koreanina profesorino venis en Bourg kun 5 kolegoj kaj Esperanto 38 ricevis 2 danojn.

Moûtiers kaj Albertville akceptis Beninanon. Philippe Pellicier (Moûtiers), kun Mireille Grosjean (Svisio), vizitis Beninon por instrui la lingvon kadre de la Esperanto-semajno en Kotonuo organizita de « Scioj sen bariloj ». Kadre de tiu semajno okazis « unua kontakto-semajno » en kiu partoprenis trideko da homoj eklernantaj Esperanton.

Aliaj homoj kaj infanoj partoprenis dum la semajno en kursoj diversgradaj. Ĉiuj trapasis ekzamenojn fine de la semajno. Pierre Grollemund (Saint-Étienne) havas rilatojn kun Esperantistoj de Rutĉuru (en Nord-Kivu en DRKongo) kiuj loĝas en rifuĝejon apud la urbo Goma, kaj provas helpi ilin.

Aliaj rilatoj : Bourg-en-Bresse organizis skajpan konversacion al eksterlando, kaj pripensas kun amerikano al virtuala Esperanta universitato. Pluraj esperantistoj partoprenis en kongresoj.

RAPPORT 2013 RHÔNE-ALPES

PRESENTATION DES CLUBS

clubs	correspondants	Nombre de membres	Nombre d'élèves	enseignant	actions
CERL	Sylvie Plantier				Participation au salon Primevère Centre d'examen pour les examens KER
Esperanto Vive Chambéry	Claudette Abry	15	10	Claude Pépin	Stands lors des manifestations. Rapprochement avec une autre association qui travaille dans un quartier avec une grande mixité sociale. 3 personnes en difficulté sociale et (ou) scolaire apprennent l'espéranto comme tremplin pour les langues étrangères

					(français ou anglais)
Espéranto Tarentaise	Emmanuelle Paris	Groupe scindé en 2		Philippe Pellicier	Tentatives difficiles dans les écoles
Eo Albertville	Rolande Cleizergues		3 Kom. 3 Pro.	Rolande Cleizergues Philippe Pellicier	Intervention à la ludothèque Beaucoup de jeunes intéressés lors des vide-greniers
Grenoble Esperanto 38	Claude Gerlat	25			Un membre primé deux fois au concours Bel Arta de UEA Les deux clubs se rapprochent mais ne fusionnent pas pour une meilleure action dans les différentes localités autour de Grenoble. Un adjoint au maire de Fontaine très favorable à l'espéranto
Saint-Étienne	Pierre Grollemund	26	3 Kom. 8 Pro. 2 labor.		Des réunions et cours à Saint-Étienne Une conférence en mai devant 20 jeunes étudiants Participation aux festivals (curieux voyageurs), aux fêtes de quartiers Relations avec plusieurs pays et en particuliers étroites et solidaires avec le camp de réfugiés près de Goma (Congo ex Zaïre)
Bourg-en-Bresse	J.louis Gayet	35	3 cours		Châtillon sur C. a rejoint Bourg. Conversation. Radios locales et RCF, relation avec la Chine par Skype. Accueil d'étrangers vivant dans la région lors des tournées (Tadjikistan, Corée, Argentine...) Chaque membre prépare un jeu et chacun apporte un plat pour les réunions 7 « komitatanoj » ont un rôle défini et chacun est responsable de son domaine
Romans	Mireille Besset	26	2 Kom. 1 Pro. 5 babil. 6 traduk.	Mireille Besset Gaston Riste Roger Arcen Gaston Riste	1 réunion par mois avec repas avec mots croisés, conférence (Thierry Saladin), diaporama Journée commune annuelle avec Valence
Valence	Gisèle Larsson		5 tous niveaux)		Une permanence mensuelle Une réunion informelle de conversation mensuelle
Oyonnax					Club vide mais non fermé. Pierre et Evelyne Chibleur restent les forces vives
Esperanto 74	Robert Frey	12	8		

ACTIONS RÉGIONALES

Congrès

En 2013, aucun club n'ayant désiré s'occuper d'un congrès régional, il a été réduit à une demi-journée pour l'assemblée générale qui a eu lieu au koToPo à Lyon.

Stage régionaux

Ils sont au nombre de 3 et durent une ou plusieurs journées.

- Stage d'une journée à Lyon en janvier dans une librairie associative avec environ 25 personnes avec Renée Triolle.
- Stage de Lajoux dans le Jura dans une maison appartenant à Châtillon sur Chalaronne avec Pierre Thévenard
- Stage N° 3 : ?

Publicité

Saint-Étienne, avec l'accord de la région, a répondu à une proposition d'un encart publicitaire dans le *Nouvel Observateur régional*. Pour notre région, cela correspond à deux parutions. Dans l'une d'elle, il y avait une erreur. Nous n'avons donc payé que demi-tarif. Mais nous n'avons eu aucune retombée. Nous ne recommencerons pas.

6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Nova estraro

Fine de oktobro elektiĝis nova estraro. Ĝi konsistas el :

- David Hauser : Prezidanto
- Alexandre Raymond : Vicprezidanto
- Quentin Weber-Seban : Kasisto kaj reprezentanto al UFE
- Jérémie Bert : Sekretario
- Laetitia Bert : TEJO-Komitatano A

Aldone, Julia Hédoux estas reprezentanto de UFE ĉe JEFO. Ĉiuj estraranoj estas komitatanoj, kune kun Meva Cuenot, Adeline Reynaud kaj Maena Volant.

Informado kaj komunikado

Kunlabore kun UFE, JEFO daŭrigis sian sukcesan eldonadon da kalendarretoj. Tiuj kalendarretoj ankaŭ enhavas informojn pri Esperanto kaj unu bildon. Ili estas senpage disdonitaj dum grandaj kunvenoj – Fête de l'Huma, Salon des Langues, ekzemple – kaj same senpage senditaj al mendantoj. Eblas donaci monon al JEFO pro tiuj kalendarretoj – tio helpas nin daŭrigi tiun gravan iniciaton.

Aranĝoj organizitaj de JEFO

JEFO-renkontiĝo denove estis granda sukceso. En 2013, FESTO okazis aŭguste en la mezo de la iama Esperanto-ŝtato, la Neŭtrala Moresneto, en la belga vilaĝo Kelmis. Ĝi estis ĉeforganizita de Alexandre Raymond kaj kunigis pli ol 100 partoprenantojn. Ankaŭ la organizteamo estis internacia, kun ĉeesto de Roĉjo Huurman interaliaj. Ni dankas Flo Martorell, kiu ofertis kiel ĉiujare riĉan kulturalan programon, de Kapriol al Kajto tra Jonny M kaj famaj lokaj artistoj kiel René Binamé kaj Gaétano.

Ĉi-jare, FESTO revenas en Francio de la 16a ĝis la 23a de aŭgusto 2014, en le Pont-de-Barret, eta vilaĝo apud Montélimar. La temo estos *Revivigli la planedon*. Pli da informoj alvenos baldaŭ !

Krom FESTO, ni decidis restarigi etajn semajnfajnajn renkontiĝojn. Kun la helpo de Delphine Ya-Chee-Chan, Armelle Piolet kaj Maena Volant okazos unua semajfino en May-en-Multien (Seine-et-Marne) komence de marto. Aliaj semajfinoj estas planitaj dum la jaro.

Eksterlandaj aranĝoj

La komitatanoj denove partoprenis la gravajn eksterlandajn jarajn aranĝojn, kiel KKPS en Delft (Nederlando), JES en Naumburg (Germanio), IJS en Tiszafüred (Hungario) kaj IJK en Nazareto (Israelo). Tiu ebligas reprezentadon de JEFO ene de la movado kaj varbadon da novaj francaj membroj.

Ni ankaŭ decidis proponi al membroj partopreni malmultekoste niajn trajnkaravanojn. Iniciatitaj de Alexandre Raymond, trajnaj karavanoj estas agrablaj antaŭ- kaj postkongresoj. Por la venontaj someraj renkontiĝoj, eblas kiel JEFO-membro vojaĝi rabate per ili.

Ni ankaŭ pludaŭrigis kontrakton kun du eŭropaj junularaj organizoj por "interŝanĝi" membrojn dum renkontiĝoj : IEJ (Itala Esperantista Junularo) kaj HEJ (Hungara Esperanto-Junularo). Tiel, JEFO-anoj povis partopreni senkoste al IJF kaj IJS. Interŝanĝe, IEJ-ano kaj HEJ-ano povas partopreni senpage al FESTO.

Grundtvig projekto

JEFO partoprenas Grundtvig projekton, kadre de la eŭropa programo pri tutviva edukado kaj trejnado, kune kun Nederlanda Esperanto-Junularo, Esperanto-Asocio de Skotlando, Federacio EDE, Pola Esperanto-Junularo kaj ARCI Esperanto.

La temo estas *Volontulado kiel persona pluevoluiĝo : kiel pliboniĝi ?*. Celas pri plispertigi kaj pliprofesiigi junajn geaktivulojn kaj per trejnado kaj per interŝanĝo de bonaj trejnadpraktikoj inter la partoprenantaj organizoj. La ĉefa celo de la projekto enkadriĝas en la agadkampoj Kapabligo kaj Aktivula Trejnado, internacinivele antaŭenigataj de UEA kaj TEJO. Danke al la ricevita subvencio, JEFO povas ebligi siajn membrojn senpage partopreni trejnadojn, ekzemple pri negocado, merkato aŭ financa mastrumado.

Retpaĝaro kaj dissendolisto

La retpaĝaro de JEFO estis ĝisdatigita kun multaj novaj informoj interalie pri la diversaj renkontiĝoj kaj pri nia projektoj. Meva Cuenot kaj Benoît Soubeyran (nova membro de JEFO) freŝe proponis helpi por aldoni novajn enhavojn kaj traduki ilin esperante. Vizitu nin : <http://esperanto-jeunes.org/>.

Nia jefo-membroj dissendolisto fariĝis jefo-anoncoj. Ĝi estas malferma al ĉiuj. Ni invitis la homoj kiuj partoprenis ikurso en lastaj jaroj aliĝi al ĉi-tiu listo. Cirkaŭ 15 homoj aliĝis !

Pluevoluiĝo de JEFO

JEFO perdis multe da membroj – aktivajn kaj neaktivajn – en la pasintaj jaroj. Pro tio, ni decidis elpensi novan strategion por revivigi la francan junularan esperanto-movado. Laborplano estis verkita kaj publikita rete post larĝa konsultado. Ĉefaj prioritatoj estas repensi la strukturon de la asocio, pli bone komuniki al niaj membroj ekzemple kun informletero, organizi novajn aktivaĵojn kiel la semajnfinoj kaj pli bone interkonekti kun aliaj organizoj, kiel TEJO aŭ la regionaj asocioj. Kaj precipe, ni devas trovi novajn volontulojn por helpi realigi tiujn celojn. Feliĉe, kelkaj homoj jam proponis helpi.

Ni konscias pri la multaj defioj antaŭ kiuj ni staras, sed vidas tiun jaron kiel okazo realigi la multajn eblecojn de Esperanto-aktivado. Tio jam komencis kaj plifortiĝos. En januaro 2014 jam membras 26 homoj. Estas pli ol tuta la pasinta jaro. Ni dum la jaro daŭrigos tion reaktivadon.

David Hauser, Quentin Weber-Seban

6.2. Groupe des enseignants espérantophones (GEE)

Laŭ la loko niaj gekolegoj agis plej bone kiel eble...

Vidu aldona tabelo de la instruantoj kaj kursoj.

6.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

De la dormanta Franca Katolika Esperanto-Asocio (Association Catholique Française pour l'Espéranto), al vi ĉiuj tutkoran saluton de ni, kiuj estis membroj de la komitato. Bonegan Jaron 2014 !

Bedaŭrinde, duan fojon, post la nekomprenebla malapero de Bruno Masala – kiu neniam klarigis ĝin –, same denove nia sekvanta prezidanto ne plu faris ion ajn. Ni tiom ĝojis, kiam Victor Simonnet, afabla – kaj denaska ! – junulo, konsentis iĝi nia prezidanto! Li jes ja havis multajn malfacilaĵojn, labor-problemojn, k.t.p. ; lia patro forpasis; eble aliaj kruelaj okazaĵoj; kiel scii? Li diris pri tio nenion, sed ne plu faris ion. Kiel Bruno, li nek informis nek demisiis. Neniu kunveno de la komitato, neniu ligilo al la membroj.

Nur estis meso en Artigues, dank'al Sylviane LAFARGUE, okaze de la internacia kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) kaj de la ĝenerala asembleo de Espéranto-France.

Helpe de Anne-Marie CHANEY, Marie-Thérèse MARIN, Daniel CHEVALIER kaj mi, staris ĉiujare budo de FKEA dum *Les Semaines Sociales de France*.

La 6an de novembro 2013, ni partoprenis meson, en la preĝejo Saint-François-Xavier, por sukceso de UNESKO en siaj streboj. Informis kaj akompanis nin Renée TRIOLLE.

La Universitato Sorbonne Nouvelle por havi pli da spaco en sia biblioteko, transdonis al ni multajn librojn kaj dokumentojn (el Sinjoro Roland Jossinet), inter kiuj, jarkolektoj de la revuo *Espero Katolika*.

Iu maljuna esperantista katolika pastro telefonis antaŭ nelonge por proponi tradukojn.

Vincent PEINGNEZ partoprenis kunvenon de Taizé en Strasburgo.

En la Bibliaj Tagoj, ekumena renkontiĝo, kiu okazis en Strasburgo, de la 13a ĝis la 17a de marto 2013, partoprenis pluraj FKEA-anoj, nome Benoît ENTE, Victor SIMONNET, Daniel kaj Marie-Thérèse CHEVALIER.

Mi iĝis membro de Réseaux du PARVIS, kie, kompreneble, mi diskonigas Esperanton (komence kaj dank'al René Ballaguy).

Finfine... tamen FKEA iomete “radiis”, ĉu ne ? Sed sen organizi nek informi... Kaj do ne eblas fari agadraporton nek finanĉan raporton. Kaj, kompreneble, nenion ricevante, nedumvivaj membroj ĉesis sendi kotizon, ne utilan, se oni faras nenion.

Nun, nur Anne-Marie Chaney kuraĝe iniciatis alvoki nin por provi ankoraŭ revivigi nian asocion, kaj naŭ personoj partoprenis la rendezuon en la sidejo de Espéranto-France mardon la 21an de januaro 2014. Bonŝance Victor Simonnet ĉeestis, kaj ni ĝojos, se li konsentos energie partopreni revigligon de FKEA. Kiu kuraĝos iĝi nova prezidanto? Kiam venis al mi la ideo proponi proponi tion al nia valora “eklezia konsilanto”, li tuj pretis – tio esta mirinda bonŝanco –, sed li bezonas dominikan permeson, kiun ni fervore esperas. Almenaŭ ĝis 2015...

Michèle Abada Simon kaj Daniel Chevalier

6.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

Jara Raporto de FET ne ricevita por la periodo 2012-2013.

Viaj notoj